

Usona Esperantisto № 2019:3 (maj-jun)

Anoncoj

Eventa Servo fariĝas servo de UEA; Board meeting minutes available online; NOREK-2019 en Sidney, BC; Nova rimedo de UEA por disvastigi Esperanton; UEA kongresos en Belfasto en 2021

Kvin grandaj anoncoj

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Lokaj grupoj; USEJ; UK-2020; donac-kampanjo “Esperanto in the USA”; nia financa stato

De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Raporto pri PER en Norda Karolino

loke • Tim GEE

Imagu, ke estas printempa mateno en la montoj de Norda Karolino.

La sekreta Esperanto-armeo

historie • HOSS FIROOZNIJA

Multaj jam aŭdis pri la kurioza manlibro *Esperanto: The Aggressor Language*, eldonita de la usona armeo. Malmultaj scias, ke la historio de Agresanto (kaj ties uzo de Esperanto) estas efektive multe pli profunda.

Up-to-date With “The Aggressors”

el la arĥivo

A report from 1964 about the use of Esperanto as the language of the U. S. Army's Aggressor Force.

Krucvortenigmo

enigmoj • Timothy BORONCZYK

Revenas nia defio por vortludemuloj.


La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La tria en serio de bildstrioj danke al Timoteo BORONCZYK.

Senintencaj esperantaĵoj?

amika, mendota, vakos, vendi



Anoncoj

Eventa Servo fariĝas nova servo de UEA

UEA informas, ke la retejo

Eventa Servo

<http://eventaservo.org/>

fariĝis nova servo de la

Asocio. Kreis ĝin la brazilano

Fernando ŜAJANI por listigi

Esperanto-eventojn

tutmonde. La celo estas ebligi al esperantistoj scii, kio okazas en Esperantujo, kaj samtempe diskonigi siajn proprajn eventojn.

Ĉiuj rajtas uzi la servon senpage. Se vi emas donaci por subteni ĝin, kontaktu fmaiajr@gmail.com.

Alternative, vi povas **fariĝi individua membro de UEA** <http://uea.org/alighoj/alighilo>.

“Eventa Servo estas tio, kion mi atendas de monda organizo”, substrekis UEA-prezidanto Mark FETTES, dum la laboroj pri la akiro de la servo. La kreinto deklaris, ke li “komprenas Esperanton kiel ilon por pacigi kaj interfratigi la homaron” kaj “esperas, ke per UEA Eventa Servo povas kreskigi la Esperantan movadon monde, kun ama, paca kaj frateca sento”.

Board meeting minutes available online

Want to find out what your Board of Directors has been up to? Since 2017, minutes from meetings of the Executive Board are posted to a members-only section of our website. Esperanto-USA is facing serious challenges and undergoing dramatic changes, so it's important to stay informed about how your elected officers are representing you. The minutes contain records of the Board's discussions, debates, resolutions, and the decisions that will determine the future of Esperanto-USA.

To access the minutes you'll be prompted for login credentials — the same ones you use to read the latest



issue of *Usona Esperantisto*. If you've forgotten them, please contact the Central Office for a reminder.

NOREK 2019 en Sidney, BC



NOREK-2019 okazos en Sidney, BC, inter la 27-a kaj 29-a de Septembro. Necesas minimume mendi tranoktadon por la 27-a kaj 28-a. Estas multaj eblecoj en Sidney kaj Viktorio. Transporto de Viktorio al Sidney per buso okazas hore, kaj daŭras proksimume 40 minutojn.

Ekzistas diversaj eblecoj de tranoktado, kaj senpaga tendumejo estas tre proksima al la kongresejo. Legu pliajn detalojn en la **NOREK-grupo ĉe Facebook** <https://www.facebook.com/NOREKCANADA/> kaj anoncu vian bezonon kaj intencon veni al wallydutemple@telus.net.

— Wally duTEMPLE wallydutemple@telus.net

Nova rimedo por disvastigi Esperanton

UEA invitas vin ekkoni kaj

uzi la **retejon esperanto.net**

<http://esperanto.net>,

rimedon kiu provizas bazajn informojn pri Esperanto, kiel lerni ĝin kaj kiel

kontakti landajn, regionajn aŭ lokajn asociojn. La informoj disponeblas en 66 lingvoj kaj la retejo aŭtomate montras la lingvon de la vizitanto.



Per la retejo jam aliĝis pli ol 600 Amikoj de Esperanto – homoj, kiuj ĵus konatiĝis kun Esperanto kaj al kiuj UEA sendas mesaĝojn por sciigi ilin pri la lingvo, pri UEA, pri TEJO kaj pri la koncerna landa asocio.

La retejo apartenas al vi. Uzu ĝin kaj helpu disvastigi ĝin al ĉiuj. Indiku la retejon al viaj ne-esperantistaj amikoj.

UEA kongresos en Belfasto en 2021



Por la 106-a Universala Kongreso la Estraro de UEA elektis la “smeraldan insulon” kiel kongreslandon. La UK la unuan fojon okazos en tiu parto de Eŭropo, kaj

la gastiga urbo estos Belfasto, la ĉefurbo de Nord-Irlando. Grava haveno kaj pordo, Belfasto suferis dum la lasta jarcento pro armita politika konflikto, sed nun estas inter la plej sekuraj urboj en la brita insularo.

Konante la malmultecon de la lokaj movadaj fortoj, UEA traktis rekte kun la urbo pri la kondiĉoj de la invito kaj ricevis tre favoran oferton de kongresejo en *Queen’s University* (la Reĝina Universitato). La loka grupo en Belfasto jam donis plurajn praktikajn konsilojn pri la organizado kaj esprimis sian pretecon helpi pri ĉiuspecaj lokaj aferoj. “Belfasto ja estas surpriza, sed bonega interesa elekto”, ili komentis.

Ankaŭ Joy DAVIES, la sekretario de Esperanto-Asocio de Irlando, mesaĝis pri sia subteno: “En Irlando estas nun malmultaj organizitaj esperantistoj, sed ni bonvenigas la kongreson kaj certe helpos, kiom ni povos. Ni esperas, ke ĝi allogos novajn lernantojn, parolantojn kaj apogantojn de la lingvo al nia asocio”.

D-ro Séan O’RIAIN, irlanda diplomato, kiu aktivas interalie en Eŭropa Esperanto-Unio, komentis: “Mia unua reago estas forte pozitiva. Kompreneble mi ĉion faros por antaŭenigi la kongreson”. El Britujo D-ro Geoffrey GREATREX reagis kun simila entuziasmo: “Kiel antaŭa prezidanto de EAB, mi tre fieras kaj kontentas pri la planata UK en Nord-Irlando, la unua en la irlanda insulo kaj pli ol 30 jarojn post la lasta UK en la brita insularo”.

La 106-a UK estas planata por okazi de la 17-a ĝis 24-a de Julio, 2021.

amika

senintenca esperantaĵo • Steve EICHBLATT



Steve afable sendis foton de la jena reklamo, kiun li trovis en novjorka metroo. Do aldone al la butikoj *amiko* (vidu n-ron 2014:02), nun ekzistas ankaŭ la ŝika *amika*. Ĉu sekvos *amike* (ne tute unike)?

De la estraro

En ĉiu numero de *UE* ni petas al la estraranoj raporti lastatempajn farojn. Ĉu vi havas demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro? Sendu ilin al ni en aŭ Esperanto aŭ la angla, laŭ via prefero. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono.

Aktivas nia kanalo en YouTube

Saluton denove, karaj samideanoj! Dum la lastaj monatoj, mi registris 11 filmetojn por la jutuba kanalo de Esperanto-USA. Krom tio, mi ankaŭ registris tri pli longajn filmetojn por mia propra kanalo (kaj baldaŭ faros pli), dank' al malgranda sed tre malavara stipendio de nia Fonduso por Edukadoj Filmoj, kiu helpis min akiri la materialojn por registri pli bonajn filmetojn.



Kiel parto de tiu stipendio, mi promesis registri kaj publikigi almenaŭ 20 novajn filmetojn. Plue, E-USA gastigis kaj publikigis intervjuon kun niaj kandidatoj por la nova estraro. Oni povas trovi ĝin ĉe nia jutuba kanalo, por ekkoni la novajn estraranojn iomete pli bone. Ĝi estas la unua tia intervjuo, laŭ nia scio, en la tuta historio de E-USA. Plejparte, la filmetoj, kiujn mi registris dum la pasintaj monatoj estas parto de nia serio *Aktivigu*, kiun vi devas spekti se vi iam ajn diris “mi volus fari pli pri Esperanto, sed mi ne scias kion fari.” Mi ankaŭ planas registri iom da filmetoj dum IJK ĉi-somere, en Slovakujo. Abonu la **jutuban kanalon de E-USA** <<https://www.youtube.com/user/EsperantoUSA>> por spekti tiujn!

— Charlotte BURTON, Direktoro

Finding books from E-USA at Amazon

Some have raised concern over whether Esperanto books sold on Amazon are legitimate or poor translations. E-USA sells authentic books through **this Amazon link** <<https://tinyurl.com/y4yb7xku>>. Be on the lookout for a recommendation list from E-USA of other Esperanto books, not sold by

us but still available on Amazon, that we have vetted and know to be authentic.

Remember when buying on Amazon to use the URL



<http://smile.amazon.com> and select “Esperanto League of North America” as your designated charity. A small portion of each purchase you make through the Smile link will be donated to E-USA.

— Paige FELDMANN, Director

Jordon KALILICH, Direktoro

Mi verkas ĉi tiun rubrikon ĉe la Landa Kongreso, kaj kvankam ĝi ankoraŭ ne finiĝis, mi jam povas raporti de ĝi bonan novaĵon.



En la pasinta jaro mi kaj Nikvo WOODS starigis komitaton por reteni membrojn. Ĉar ni estas samurbanoj, estis facile kunlabori. Ni skribis (manel!) leterojn al 51 personoj, kies membrecoj ĉesis antaŭ almenaŭ ses semajnoj. En la leteroj ni demandis, kiel E-USA povus pli bone servi ilin. Mi prezentis la rezultojn dum estrara kunsido ĉe la LK.

Post kiam ni sendis la leterojn, ok el la ricevintoj remembris. Tri el ili sendis respondojn, kaj estas facile supozi, ke ankaŭ almenaŭ la plejmulto de la ceteraj remembris pro la leteroj. La laboro do estis fruktodona, kaj mi rekomendis ke ĝi estu daŭrigata.

Aliaj homoj ne remembris sed tamen klarigis al ni siajn motivojn. La plej ofta estis financa malhavo. Ĉe la kunsido mi rekomendis sciigi al ekzistantaj membroj, ke ni ofertas malpli kostan membrecon al tiuj kun limigitaj enspezoj.

Mi supozis, ke oni ne remembris pro malkontenteco pri E-USA, sed neniu el la

respondintoj tion diris. Tio kompreneble ne signifas, ke ni estas perfekta organizaĵo. Ni daŭre bonvenigas komentojn de membroj – kaj plu petos ilin de eksmembroj – por ke ni povu pli bone roli kiel asocio via.

— Jordon KALILICH

Who have you told about Esperanto?

I found out about Esperanto in 1973. I was driving my car from the university to work and heard a short Esperanto lesson on the university radio station, WOSU, in Columbus, Ohio. Jane A. Willis was the instructor and I gave her a call. Jane invited me to her home where she explained more about the language and gave me some materials and addresses to follow up. One of the items she gave me was a booklet *Esperanto for Beginners* (Butler) which piqued my interest enough to order more publications so I purchased: *The Esperanto Teacher* (Stuttard, 1970), *Teach Yourself Esperanto* (Creswell & Hartley, 1968), an Esperanto dictionary (Wells, 1969) and *Step by Step in Esperanto* (Butler, 1965) all of which I still have. I even joined ELNA and UEA and got *El Popola Ĉinio* mailed from China (I bet I'm on someone's list for that).

I was 30 then and just finishing up my bachelor's degree after returning from Viet Nam. I made a stab at the texts but couldn't maintain the time requirement with college, graduate school, a marriage, two kids and a demanding professional career. I retired after 45 years of work and moved to Raleigh. Esperanto was on my bucket list and I got re-introduced to it by hooking up with Chuck Mays in 2016.

I found out about Esperanto by accident, the way most people do and maybe you too. We need



something more intentional to acquaint people with Esperanto.

Marketing is defined as the “the activity for creating, communicating, delivering or exchanging an offering that has value for the customer.” Someone is trying to impress someone else about something, on purpose. When you watch a program on TV you will probably see commercials. You didn't plan that, but somebody did. It was their intent but an “accident” to you.

Some of the most influential marketing comes from people who have used the product. When they are used in advertisements they are called “testimonials” (sometimes they are actors). Testimonials give credibility and a connection to the product being advertised.

Marketing is costly. Some TV commercials can be in the hundreds of thousands of dollars. As Treasurer of E-USA, I know we don't have that kind of money, but we have our members. We need you to tell the Esperanto story — to be *our* testimonial. Spreading the word about Esperanto needs to be our intent to inform people about Esperanto and its value. You know the aspects of Esperanto. You have experienced learning it and know others who have done so too. You are the best testimonial Esperanto can have.

Chuck and I designed brochures that were stimulated by an E-USA brochure (I can e-mail you a copy). I keep them in my vehicles and leave them at my doctor's office, Starbucks, the library, Barnes and Noble (in the foreign language area), university library, the local international festival, and I talk to anyone who doesn't faint after I mention Esperanto. With approximately 600 members in E-USA, if each of us left one someplace once a month that would be 7,200 brochures a year across the country! Talk about it with friends, at church and at the library. You don't know who you will inspire.

Esperanto is the most fantastic secret that we must share. Who have you told about Esperanto today?

— Murray MERNER, Treasurer mmmm0320@gmail.com

Raporto pri PER en Norda Karolino

loke • Tim GEE



Imagu, ke estas printempa mateno en la montoj de Norda Karolino. Imagu, ke vi staras sub la portiko de via bienloĝejo en la hela varmeta sunlumo kaj rigardas, ĉirkaŭ vi, la proksiman arbaron kun junaj folioj brile verdaj. Imagu, ke vi aŭdas, ĉirkaŭ vi, la voĉojn de viaj novaj kaj malnovaj geamikoj. Imagu, ke ili parolas Esperanton. Se vi jam ĉeestis nian Printempan Esperanto-Renkontiĝon (PER), ne necesas imagi tian matenon, vi spertis ĝin en Aprilo.

PER2019 okazis en Valle Crucis, NC, ĉe **The Valle Crucis Conference Center**

<<https://vcconferences.org/>> la lastan semajnon en Aprilo. La kosto inkluzivis manĝojn kaj loĝadon. Ambaŭ estis bonegaj.

Ĉi-jare ni havis dek kvin partoprenojn. Kune kun gepatroj kaj infanoj, ni estis, dum la semajnfino, unu granda familio. Ni havis la bonan ŝancon havi Tomason ALEXANDER kiel nian instruiston kaj kunordigestron de aktivecoj. Vi povas trovi

Tomason ĉe Jutubo <<https://bit.ly/2YeV8Ke>>.



Post la vespermanĝo je vendredo, la evento komenciĝis kun diversaj vortaj ludoj, kiuj helpis nin ekkoni unu la alian. Sabaton ni laboris pri gramatiko kaj faris aliajn ekzercojn por pliigi nian lingvokapablon. Ofte ni formis malgrandajn grupojn, kie pli fluaj partoprenoj helpis la malpli spertajn.

Posttagmeze ni esploris la kamparon. Unu grupo promenis al apuda akvofalo. Alia vojaĝis al *Mystery Hill*, amuza vidindaĵo nur 20 kilometrojn for. Aliaj legis ... aŭ dormetis, verŝajne. :-) Ni re-kunvenis unu horon antaŭ la vespermanĝo por lerni pri diversaj iloj komputilaj kiuj helpas onin lerni kaj skribi Esperanton. Sabaton vespere ni ludis tabulludojn, trinkis teon, kaj okupiĝis je konversacio.



Dimanĉo estis la lasta tago. Post la matenmanĝo, Tomaso respondis al diversaj gramatikaj demandoj kaj tiam ni finis nian sesion per la ludo “difin-defio”. En la ludo Tomaso donis difinojn kaj ni devis respondi per la vorto, kiu estas taŭga je la difino.


Ĉiuj bonaj aferoj devas finiĝi, do post tagmanĝo, ni ĉiuj adiaŭis kaj vojaĝis for kun la scio, ke ni revenos je 2020. Atentu **la retejon de PER**

<<http://esperanto-nc.org/spring-esperanto-meeting/>> por informo pri nia venonta PER!

Krucvortenigmo

enigmoj • Timothy BORONCZYK

Revenas la krucvortenigmo post longa paŭzo, ĉi-foje danke al Timoteo BORONCZYK. Inter solvintoj ni lotumos \$10-rabaton de la libroservo. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la 15-a de Aŭgusto**. Bonŝancon!



Horizontale

1. Afer' de Mme. Tussauds
5. Havanta praktikan scion
9. Senparola aktor'
12. Apartenanta al aliaj
13. Kongrue
14. Voj' inter vicoj de arboj
15. Detala list' de libroj
18. Rand' de lando
19. Metroa gvidil'
20. Elfari efikon
21. Havanta jarojn
22. Inklina
23. Uj' farita el tolo
26. Vir' laŭleĝe ligita
27. Literar'
30. Perceptil' por odoroj
32. Akirita mon'
33. Plata, ne kurba
35. Gent' de sudorienta Azio
36. Trinkuj'
39. Malkonsente

Vertikale

40. Temas pri koloroj
42. Moviĝi ien
43. Ingredienc' por martinio
44. Punkt' pri kio oni parolas
45. Manĝil' kun ronda parto
47. Escepte
48. Frukta likv'
50. Aserti, ke io ne estas vera
51. Sufoka serpent'
53. Religia ceremoni'
55. Giganta flak'
57. Subita laŭta voĉson'
58. Baril' kontraŭ rivero
59. Skeleter'
62. Portant' de ganto
63. Energi' pro akvofluo
66. Utiligi
67. Uj' por la cindroj de mortinto
68. Nenio alia ol
69. Mebl' por pugo
70. Mallonga sporta kur'
71. Popolsperta epope'

1. Er' de sono
2. En malsama maniero
3. Direkt' al kiu islamanoj sin turnas preĝante
4. Natria klorid'
5. Frapfraz'
6. Kvitiĝe transdoni monon
7. Plurregna monunu'
8. Ŝategi
9. En maniero krude ofenda
10. Epope' pri la troja milito
11. Nur per si
16. Malspecifa tempo
17. Rotacia stang' de rado
22. Sicilia vulkan'
24. Mineral' kun diverskoloraj tavoloj
25. Malpeza boat'
27. Puna kompens'
28. Agi kiel ordonite
29. Denova naskiĝ'
31. Baza er' de materi
34. Teatra rolant'

35. Desegnaĵ' sur haŭto
37. Granda kolekt'
38. Najbar' de Turkujo
41. Peli boaton
46. Korneca elkreskaĵ' de fingro
49. Person' kiu konfidis al aferisto
52. Senplane
54. Ĝena enu'
56. Predbird'

58. Flora pikil'
59. Task' kiu tiras al si atenton
60. Mark' sur zebro
61. Fervoja retpar'
62. Pred' de kato
63. Fleksebla tub'
64. Apartigi fibrojn trempe
65. Malekstere

Kvin grandaj anoncoj


de la prezidanto • Filippo DORCAS

La jenaj informoj estas taŭgaj kiel **enklubaj anoncoj**, aŭ por la **regionaj kunordigantoj**, kiuj kontrolu ĉu la kluboj en la koncerna regiono jam havas la informojn por disdoni al la klubanoj.

- **Lokaj grupoj** estas tiel gravaj, ke la estraro de Esperanto-USA pli kaj pli donas atenton al la helpo kaj rimedoj por lokaj kluboj. Ĉi tiuj rimedoj pli kaj pli pasas tra la manoj de la regionaj kunordigantoj. Se via loka grupo ankoraŭ ne uzas la ilojn *Meetup*, *Amikumu*, aŭ *Duolingo events*, eble vi kontaktu vian helpanton en via regiono. Aŭ, se via klubo bezonas alispecan helpon, nepre informu vian kunordiganton en via regiono.
- La junuloj reorganiziĝas! USEJ (la **Usona Esperantista Junularo**) denove aktivis kun gvidantoj. Sekvu anoncojn en la venontaj numeroj de *Usona Esperantisto*, en nia retejo, aŭ en nia Facebook-paĝo. La reaktiviĝo de la junularo estas grandega paŝo por la movado en Usono.
- Nia Landa Kongreso en 2020 okazos en **Montrealo** dum la **Universala Kongreso** de UEA. Ni ne havas kutiman landan kongreson aparte de la UK. Ni helpas la kanadajn amikojn gastigi la Esperantan movadon de la tuta mondo en 2020! Ni bezonas volontulojn nun kaj ankaŭ dum la kongreso. Via estraro estos en kontakto kun la organizantoj en Kanado en la venontaj monatoj. Sed, **NEPRE PLANU PARTOPRENI** en Montrealo en 2020!

- Nia kampanjo ***Esperanto in the USA*** progresas. Nepre donu iom da mono al nia kampanjo. Vidu informon en nia retejo. Eĉ se vi ne donos kelkcent dolarojn, vi povas fari ion. La mono helpas la junulojn organiziĝi kaj trejniĝi por helpi ĉe la UK en Montrealo. La mono helpas al lokaj grupoj havi rimedojn. La mono helpas membrojn partopreni eventojn. Ni havas bonajn projektojn, kiuj ne rilatas al nia ĝenerala fonduso. Memoru, ke se vi donos cent dolarojn al la kampanjo, la kampanjo ricevos ducent dolarojn pro la sama dono de *Esperantic Studies Foundation* ĝis la tuta kampanjo atingas la celon de \$15,000. Ni bezonas vian subtenon pere de tiu kampanjo. La junuloj, la lokaj grupoj, organizantoj de la Universala Kongreso, kaj aliaj gvidantoj dankos al vi.
- Nia ĝenerala **financa stato** multe pliboniĝas, dankon al la atento de la estraro kaj la decidoj pri la Centra Oficejo. Nia CO nun situas en la ŝtato Majno anstataŭ en multekosta oficejo en Emeryville, Kalifornio. Por ĉi tio ni dankas al Vilĉjo HARRIS, nia direktoro. Vi legu nian **jarraporton** por esplori la financajn detalojn.

Ek kaj antaŭen!



Filippo DORCAS

Filippo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

La vivo de Peĉjo

Ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.

La sekreta Esperanto-armeo

historie • HOSS FIROOZNIA



Prezentu **ARMILoj!** (Translation: Present ARMS! Pronunciation: Pre-zen-tu AR-MEE-LOY.) Trigon troop commander and his staff salute absent dictator leader. Note armed bodyguards protecting the top-secret war map at rear

El *Amerika Esperantisto*, majo-aŭgusto 1964.

Eble vi jam aŭdis pri la kurioza manlibro *Esperanto: The Aggressor Language*, eldonita de la usona armeo en la fruaj jaroj de la Malvarma Milito.

Agresanto estis fikcia malamiko elpensita de la usona armeo por militekzercoj. Usonaj soldatoj mem ludis la rolon, uzante Esperanton por ŝajnigi sin fremdaj al siaj samlandanoj. Armea **manlibro FM-30-101-1** <<https://bit.ly/300tCAA>> instruis al ili la bazan gramatikon de Esperanto kaj nomojn de diversaj armiloj (*flamĵetilo*, *grenadĵetgilo*), rangoj (*ĉefserĝento*, *regimentestro*), veturiloj (*duontirilvagono*, *destrojero*) kaj tiel plu.

La iama gazeto *Amerika Esperantisto* aperigis anglalingvan artikolon pri la Agresanto-programo en sia numero por majo-aŭgusto, 1964. Jen citaĵo, elangligita:

Kiam ajn soldatoj de la usona armeo ekaktiviĝas dum manovroj en trejn-ekzercoj ... ili renkontas fortan, organizitan repuŝon de "Agresanto" – bone trejnita malamiko kiun oni ofte nomas *Triangulo*. Vestita en ĝangal-verda uniformo kaj parolanta la strangan lingvon Esperanto, Triangulo estas vera malamiko,



Cirklo-Triangulo: emblemo de Agresanto.

malgraŭ tio, ke li reprezentas fikcian landon kies totalisman registaron regas la senkompata politika partio Cirklo-Triangulo ...

La unua manlibro temis ĉefe pri Esperanto, kaj tial ĝi nur svage skizis la malamikon. Sed eldoniĝis ankaŭ tri aliaj manlibroj kiuj detale (eble eĉ dronige) priskribis la politikan organizon de Agresanto, ties suborganizojn, armilojn, uniformojn, insignojn, kaj multe pli. Kune, la kvar libroj bildigas strangan "paralelan mondon" en kiu Esperanto-parolantaj armeoj invadas kaj okupas grandajn partojn de Usono.



Mapo kiu montras regionojn de Usono sub la regado de Esperanto-parolantaj armeoj.

La aliaj tri libroj estas nun haveblaj rete:

- **FM-30-101, *Aggressor, The Maneuver Enemy*** <<https://archive.org/details/FM30-101>>
- **FM-30-102, *Handbook on Aggressor Military Forces*** <<https://bit.ly/2RSLdIa>>
- **FM-30-103, *Aggressor Order of Battle*** <<https://bit.ly/2Jhm8m8>>

Interese, en la paralela mondo de Agresanto, same kiel en la nia, Esperanto ludas rolon de interlingvo:

TRIGON FEDERACIO
KONTRIBUTORA LIBERACIO

NOMO _____

SUBSKRIBO _____

RESPONDULO _____
APUDE SUBSKRIBO _____

Sekretario

Numero _____

Aliĝilo por la partio Cirklo-Triangulo.

Kvankam la civitanaro de Agresanto konsistas el tre diversaj etnoj, ilin unuigas la naciaj celoj de siaj regantoj. Alia unuiga faktoro estis la adopto de Esperanto kiel oficiala lingvo.

(FM-30-103, p. 12)

Sed malkiel en nia mondo, la Esperanto-parolantoj de Agresanto tute ne estis “pacaj batalantoj”!

Kial la Agresanto-projekto finiĝis? Sendube pro diversaj kialoj, sed unu estas aparte rimarkinda: laŭdire, iuj el la soldatoj fariĝis neregeblaj pro sia aparta identeco kaj lingvo. En eseo en *Brazila Esperantisto* (Nº 311, Jun 2000), J. PITON **skribis**

<<http://www.kafejo.com/lingvoj/auxlangs/eo/maneuver/agresant.htm>>:

Mi sukcesis trovi en Interreto kaj komuniki kun usona ekssoldato, kiu havis kontaktojn kun skipo de Agresantaj soldatoj. Li konfirmis al mi [ke] la agresantoj konstante deĵoris en tiu sama teamo kaj tial ili estis bonege preparitaj, pli ol la ordinara soldatoj, kiujn ili devis trejni. Superaj en la batalekzercoj, tio certe ne estis utila por la animstato de la senspertaj




Soldatoj en la sesa kaj dua armeoj.

ordinaraj trupoj.

La plej decida faktoro tamen estis la troa entuziasmiĝo de la Agresantoj. Ili havis unikan uniformon kaj propran lingvon, tial ili komencis senti sin parto de ekskluziva komunumo. Lingvo evidente rolis kiel identiga propraĵo. Ili forgesis sian apartenecon al la sama armeo de la ceteraj usonanoj kaj kelkaj ofte provokis disputojn ekster la deĵorhoroj. La provoj teni ilin sub disciplino ... estis vanaj.

Kvankam Cirklo-Triangulo jam delonge malaperis, laŭ iuj¹ homoj ĝi ankoraŭ vivas, lerte kaŝante sin inter ni. Efektive, ĝia emblemo ankoraŭ aperas diversloke tra nia lando. Foje, la emblemo eĉ enhavas abstraktajn homfigurojn – ĉu soldatojn de la Esperanto-armeo?



Eĉ hodiaŭ, restas ĉe ni simboloj (dekstre) suspektinde similaj al tiuj de la partio Cirklo-Triangulo (maldekstre).

Por vidi (kaj aŭdi) pli pri la Agresanto-programo, spektu ankaŭ la jenan **filmon pri ĝi**

<<https://www.youtube.com/embed/1-PEv8bgbtK>>

1. Aŭ pli precize, laŭ neniuj homoj.



Hoss FIROOZNIA

Hoss estas magistriĝa studento ĉe la Universitato de Roĉestro, (en Rochester, NY) kie li studas literaturan tradukadon el Esperanto en la anglan.

hoss@lodestone.org

mendota

senintenca esperantaĵo • Lance M. CLARK



Dankon al Lance pro la jena foto de skatolo, kiu ŝajne antaŭvidis sian destinton.

vakos

senintenca esperantaĵo • Hoss FIROOZNIA



Ŝajne ne nur skatoloj, sed ankaŭ konstruaĵoj povas antaŭvidi siajn destinojn. Fotita en Fredericksburg, Virginio.

Up-to-date With “The Aggressors”

Esperanto as the Official Language of U.S. Army Aggressor Force

el la arĥivo

For this issue’s dive into the archives, we visit part of a 1964 article from *Amerika Esperantisto*, the magazine of the now-extinct EANA. It featured excerpts from an article in *Friends* magazine about the use of Esperanto in the U. S. Army’s “Aggressor Force.”

“Whenever soldiers of the U. S. Army swing into action during maneuvers — in training areas all over the country — they meet strong, organized resistance from a well-trained enemy known officially as *Aggressor*, but often referred to as *Trigons*. Dressed in a jungle-green uniform and speaking the strange language of Esperanto, Trigon is a real enemy, even though he represents an imaginary country whose totalitarian form of government is controlled by the ruthless Circle Trigon political party.



Well-concealed Aggressor with light machine gun lies in wait for his U. S. enemies.

The concept of using specially trained troops to oppose maneuver forces came into being in 1946, when U.S. Army Aggressor Center was formed at Fort Riley, Kansas. Army commanders, after appraising the battlefield performance of soldiers during World War II, were convinced that something should be done to introduce realism to training programs. The purpose of Aggressor Center is to help build up the feeling of actual combat for soldiers in the field. The center directs and supervises the training of field advisory teams, procures or manufactures uniforms and equipment for Trigon troops, and prepares special Aggressor training manuals. Field advisory teams go where needed to advise unit commanders on Aggressor training, tactics, and uniforms, and to help indoctrinate Aggressors in the Circle Trigon’s political philosophy.

Aggressors use special identification cards and distribute propaganda — they even carry safe-conduct passes to hand out to U.S. soldiers who may

wish to surrender to the enemy! The Aggressor uses a sonics platoon to present combat sound effects, and an engineer platoon handles portable dummy artillery field-pieces, tanks, and vehicles. Running into a variety of realistic battlefield conditions, troops thus return from maneuvers much wiser in the ways of totalitarian warfare.”

The use of Esperanto as the language of the Aggressor Force has continued to inspire comments in the press of the U.S. and the world. A large number of soldiers, coming into actual contact with both the Aggressor and Esperanto, have written EANA for information and have become interested in learning the interlanguage for its own sake and for its usefulness in travel and world friendships.

A few months ago one of the major television networks featured a full-length movie that told the story of the deadly seriousness with which the Aggressor Force conducts its counter attacks in maneuvers. The scenes showing the interrogation of prisoners provided the opportunity to use the “aggressor language” (Esperanto) in realistic sequences.

In the official Field Manual FM30-101A, entitled “Aggressor, the Maneuver Enemy Esperanto Language”, the *Introduction* gives the following as the Purpose and Scope of the General use of Esperanto:

1. The purpose of this manual is to provide U.S. forces, portraying AGGRESSOR, with a different language, the use of which will enhance intelligence play and add realism to field exercises. Included are an elementary grammar of the Esperanto language, an English-Esperanto and Esperanto-English vocabulary, and special tables on days and months, numerals, weights and measures, and approximate conversions.
2. *a.* Aggressor has adopted Esperanto as his

official language. Although it has not supplanted the regional use of other languages and dialects, it is expected to do so eventually. The adoption of Esperanto as the official language does not prohibit the oral use of any local language by prisoners of war, casualties, or other Aggressor personnel, or the written use of any such language in the preparation of documents. ...

c. Esperanto is scientifically constructed

and adapts to its own use wordroots from various Indo-European languages.

Incorporation of roots and of internationally accepted words into the language is facilitated by the extreme regularity and simplicity of Esperanto grammar. ...”

The Esperanto vocabularies in the Aggressor manual are excellently done. They contain many terms not found in older Esperanto dictionaries. There are about 5,000 in the manual.

vendi

senintenca esperantaĵo • HOSS FIROOZNIA



Konvena nomo por firmao, ĉu ne? Trovita sur kamiono en Rochester, NY.